# BRAZILA KRONIKO

INFORMILO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Jaro 3ª ★ Januaro - Decembro/80 ★ nº 2





# Esperanto-Kurso per radio, diskoj kaj sonbendoj



# Antaŭparolo de la Redaktoro

Kiel unua tasko, kiel nova redaktoro de BRAZILA KRONIKO, mi devas peti pardonon, en la nomo de la tuta estraro de BEL. Ni havas nenian dubon pri la negativaj konsekvencoj de malfruo aŭ neapero de atenditaj komunikiloj. Rekonante la valoron de niaj bultenoj por ni kaj por la brazila esperantistaro, ni devas prezenti al niaj anoj, krom pardonpetoj, ankaŭ klarigojn.

Petante komprenon rilate al la malofteco kaj malfruo de niaj periodaĵoj, ni repromesas fari la eblon por transsalti la barojn kaj venki la malfacilaĵojn starantajn en nia vojo.

Kun la kreskado de la anaro kreskas ankaŭ la laboro de la estraro de BEL kaj de ĝia volontula servgrupeto. Je tago post tago kreskas la nombro de alvenantaj korespondaĵoj, kaj la en-klasaj kursoj postulas pli kaj pli da instruistoj, malpermesante, ke kelkaj el ili agu en aliaj ankaŭ gravaj laborkampoj; oftaj vizitoj kaj telefon-alvokoj de esperantistoj kaj neesperantistoj, kiuj serĉas nin por peti informojn, mendi materialon, aliĝi al esperantaj institucioj kaj aboni eksterlandajn revuojn jen kelkaj el la problemoj, kiuj postulas specialan zorgon de tiuj, kiuj idealisme laboras ĉe BEL. En aliaj lokoj de ĉi tiu informilo vi povos kontroli, ĉu ni trograndigas la problemojn.

Bonvolu cerbumi pri la sekvanta demando: Ĉu ni devas interrompi la varbadon de novaj anoj ĝis kiam ni havos pli taŭgan laborforton, kapablan doni al ili la meritatan atenton kaj la postulatajn servojn? Ŝajnas al ni, ke la respondo devas esti nea. Ju pli da anoj ni havas, des pli da helpo ni ricevos. Inter la novaj BEL-anoj certe estas kelkaj kapablaj kaj sindonaj idealistoj, kiuj pretos labori por nia movado. Kaj ni estas konvinkitaj, ke niaj veteranaj amikoj pacience legos ĉi tiun komunikaĵon kaj, konsciiĝante pri niaj problemoj, serĉos nin — persone aŭ perletere — por prezenti konkretajn kontribuaĵojn, aŭ almenaŭ informi, ke ili daŭre fidas nian agadon.

FERNANDO MARINHO
Ĝen. Sekretario de BEL
kaj redaktoro de Brazila Kroniko


BRAZILA KRONIKO
*(Crônica Brasileira)*

Informilo de Brazila Esperanto-Ligo
*Boletim informativo da Liga Brasileira de Esperanto*

Adreso / *Endereço*: Praça da República, 54 – 2º
20.211 – Rio de Janeiro – RJ
tel.: 232-6309

Ĉefredaktoro / *Redator-chefe*: Fernando Marinho

Presaranĝo / *Diagramação e Arte*: Alan Romero

Kompostado / *Composição*: Compósita

*Ekspedado* / Expedição: Amarílio Carvalho

# Prioritato nº 1
# ESPERANTO-KURSO PER RADIO KAJ PER SONBENDOJ

*Ekde la monato marto, la prezidanto de BEL dediĉas ĉiujn siajn fortojn al la preparo de moderna Esperanto-kurso — por uzado en radio, por memlernado kun sonbendoj kaj por instruado en klasoj. Tiu kurso estas la rezulto de multjara lernado de pluraj lingvoj laŭ pluraj metodoj, kaj ankaŭ de du-monata pristudo de la kibernetikaj metodoj uzataj en la Universitato de Paderborn. La nuna stato de tiu laboro estas la jena:*

*1 — La legolibro de la baza kaj de la progresiga kurso, NOVA AMIKO INTER NI, jam estas preta. (Kr$ 150,00). Ĝi enhavas ekzakte 1.000 vortojn, elektitajn laŭ la oficiala listo de ofteco prezentita de la Akademio de Esperanto. Ekzakte 500 vortoj aperas en la baza kurso, kaj pliaj 500 vortoj aperas en la progresiga kurso. Tiu legolibro enhavas historieton kaj kanzonojn. Ili prezentiĝas, kiel flua nuntempa konversacio, sen balastaj maloftaj vortoj. La miraklo de Esperanto estas, ke 1000 science elektitaj vortoj permesas la pritrakton de la plej gravaj nuntempaj temoj kaj de la ĉefaj problemoj de la Esperanto-movado. Tiaj temoj estas en la legolibro.*

*2 — Serio de diskoj kun la instruaj kanzonoj jam komencis aperi. Jam estas pretaj kaj akireblaj la jenaj du diskoj:*

*a) LA ALFABETO DE ESPERANTO KAJ FACILAJ FRAZOJ (enhavanta 3 tre facilajn kanzonojn) — Kr$ 150,00*

*b) KANTU KAJ LERNU 1 (enhavanta 11 kanzonojn) — Kr$ 200,00*

*Du aliaj instruaj diskoj aperos en la baldaŭaj 60 tagoj. Kvina disko aperos en 1981. La 27 kanzonoj de la kvin diskoj (kun originalaj tekstoj de Sylla Chaves) enhavas nur la vortojn jam lernitajn en la instru-metodo. Jen tri ekzemploj:*

*Kanzono I*

*(laŭ muziko de* **Marré de Si;** *france:* **Je m'en vais d'ici***)*

La unuaj tri numeroj
estas unu, du kaj tri.
En tri estas tri literoj:
T kaj R kaj I.

*Kanzono 9*

*(laŭ muziko de* **O cravo brigou com a rosa***)*

Vi lernu, amiko mia,
la lingvon de la estonto!
Kun lingvo internacia
pli bona estos la mondo!

Aŭskultu ĉi tiun kanton!
Amiko, aŭskultu min!
Se vi lernos Esperanton,
la mondo komprenos vin!

*Kanzono 20*

*(laŭ muziko de* **Adeste, fideles***)*

"Naskiĝis Jesuo!"
diras la ĉielo
per voĉo de anĝelo
sendita de Di'.

Portis Jesuo
al ĉi tiu tero
de krimo kaj kolero,
milito kaj sufero,
la lumon de espero. . .
savon por ni.

Li savon alportis
al la tuta mondo,
kaj sunos la estonto
se ni sekvos Lin.

Diris Jesuo,
ke ni devas ami.
Nur amo estas grava,
nur amo estas prava,
nur amo estas sava. . .
Ĝi savos nin!

*3 – La portugallingva lernolibro de la baza kurso, AŬDU KAJ LERNU 1, jam estas akirebla ekde la fino de oktobro (Kr$ 250,00). La sonbendoj havas kelkajn el la plej bonaj voĉoj de la brazila Esperanto-movado, kiel Affonso Soares kaj Paulo Sérgio Viana. Tiu ĉi lasta jam venis plurfoje el sia urbo Lorena, SP, por sonbendigo en nia bonega registrejo SONOVISO.*


*4 – La unua radio-kurso laŭ tiu metodo estos dissendata de* **Rádio Cultura**, *de São Paulo, SP, dum 10 ekde decembro 1980, ĉiulunde. Ĉiuj radistacioj, kiuj deziros uzi la metodon AŬDU KAJ LERNU estas bonvenaj. Se vi interesiĝas, bonvolu tuj informi tion al BEL.*

*Resume, nia prioritato nº 1 estas ĉi tiu Esperanto-kurso. Kaj ĉio alia estas provizore flankenlasita aŭ, almenaŭ, malakcelita. Kaj tiel, multe da modernaj Esperanto-kursoj povos esti dissemataj tra Brazilo dum la antaŭkongresaj monatoj, kie ajn ili estos dezirataj. Por tiu celo, BEL ne petis helpon al aliaj ŝtatoj. Kaj malgranda privata grupo el Rio-de-Janejro elspezis sola plurajn centojn da miloj da kruzejroj por tiu celo. La estonto diros, ĉu nia prioritato nº 1 estis bone elektita. Kaj Dio helpu nin.*

**LANĈO DE LA METODO AŬDU KAJ LERNU**

Lunde, la 15an de decembro je la 18a horo en la libro-vendejo de Fondaĵo Getúlio Vargas (Praia de Botafogo, 188, Rio-RJ) estos la oficiala lanĉo de la metodo AŬDU KAJ LERNU (por memlernantoj) de Sylla Chaves. Tiu metodo estas la rezulto de kunlaboro inter BRAZILA ESPERANTO-LIGO, SONO-VISO kaj FONDAĴO GETÚLIO VARGAS.

En la sama tago estos la unua dissendo de la metodo per Rádio Cultura (SP), je la 14:30 h kaj 22:15 h (mezaj ondoj: 1200 Khz; kurtaj ondoj: 49m-6165 Khz, 31m-9745 Khz, 16m-17815 khz).



# Kelkaj Informoj pri nia Sekretariejo

Ĉu vi povas imagi, kiomaj kaj kiaj estas la korespondaĵoj ĉiutage alvenantaj al nia sekretariejo? La subaj ciferoj montras kiom da korespondaĵoj ni ricevis dum la unuaj sep monatoj de 1980:

| JAN | FEB | MAR | APR | MAJ | JUN | JUL | SUMO |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 234 | 247 | 233 | 169 | 177 | 145 | 177 | 1382 |

Nia mezuma ricevo estas 8-9 korespondaĵoj ĉiutage. Tiuj ciferoj montras, ke, por niaj malmultaj helpantoj, estas malfacila afero teni nian korespondadon en ordo, kun akurata respondo al ĉiuj.

Eble kelkaj el vi, kiuj legas ĉi tiun informon, delonge atendas respondon al letero al ni sendita. Vi eĉ timas, ke ni ĵetis ĝin en paperkorbon! Tute ne! En tiun lokon ni nur ĵetas niajn personajn problemojn, ĉar ni tute ne havas tempon por zorgi pri ili. Sed tio jam estas alia temo. Ni revenu al la korespondaĵoj de BEL. En ili troviĝas libromendoj, en- kaj eksterlandaj informoj kaj informpetoj, abonoj al diversaj eksterlandaj periodaĵoj, aliĝiloj por UEA kaj multaj aliaj organizaĵoj, poŝtaj avizoj kaj leteroj de lernantoj. Ĉiu letero postulas specialan zorgon. Pluraj postulas eĉ lacigajn esplorojn. Por havi ĝustan ideon, imagu la sekretarian laboron pri letero kun plurspecaj petoj: aliĝoj, abonoj, mendoj, informpetoj kaj plendoj.

Dum la lasta semestro estis faritaj 824 enspeznotoj rilate al aliĝkotizoj, libroaĉetoj, abonoj de periodaĵoj, ktp. Sed la sekretarioj de BEL ne faras nur tion. Ili partoprenas en estrarkunsidoj, akceptas vizitantojn, sendas informojn al gazetoj kaj radistacioj, kaj ankaŭ helpas nian prezidanton en lia sindona batalado por la eldono de moderna aŭdvida instru-metodo. Ĉu sufiĉas ĉi tiuj informoj por kompatigi vin? Ni iam revenos al tiu temo, sed nun ni bezonas halti, por ne malhelpi la ĝisdatigon de niaj malfruiĝintaj revuoj. Ĉu ne?





## NORMAJ DIPLOMOJ ALJUĜITAJ DE BEL

Ĉiujare BEL aljuĝas norman diplomon al tiu, kiu, post koresponda aŭ klasa esperanta kurso, gvidita de ĝi aŭ de filiita asocio, sukcesas en la fina ekzameno.

La subaj tabelo kaj grafiko montras kiom da diplomoj estis aljuĝitaj de BEL, dum la lastaj jaroj.


Rigardu atente la grafikon kaj rimarku kiel falis la nombro de diplomitoj, dum la kriza periodo, inter 1971 kaj 1975. Sekve, observu kiel ni reagis al tiu falo. Nur en la unua semestro de 1980 ni jam havis 55 diplomitojn. Eble ni sukcesos atingi la naŭdekon aŭ la centon.

Ĉu nia kara leganto jam posedas NORMAN SUPERAN DIPLOMON aŭ PROFESORAN DIPLOMON? Kial ankoraŭ ne? Tuj zorgu pri tio!

| JARO / NORMA DIPLOMO | 1971 | 1972 | 1973 | 1974 | 1975 | 1976 | 1977 | 1978 | 1979 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| BAZA aŭ ELEMENTA | 60 | 26 | 27 | 14 | 11 | 27 | 21 | 19 | 74 |
| PROGRESIGA aŭ PERFEKTIGA (*) | – | – | – | – | – | – | – | 4 | 4 |
| SUPERA | 20 | 9 | 7 | 1 | 1 | 4 | 1 | 2 | 3 |
| PROFESORA | – | 6 | 2 | – | – | 1 | – | – | – |
| SUMO | 80 | 41 | 36 | 15 | 12 | 32 | 22 | 25 | 81 |

(*) enkondukita en 1980.

DIPLOMOJ ALJUĜITAJ



KIOM NOMBRAS NIAJ GELERNANTOJ?
ĈU NI PROGRESAS?
KONTROLU VI MEM KAJ VARBU
NOVAJN ĜEKURSANOJN!

De januaro ĝis la 31a de julio ĉi-jara, 94 gelernantoj enskribiĝis en esperantaj kursoj gvidataj de Brazila Esperanto-Ligo.
Tiuj kursoj, ĉu korespondaj, ĉu klasaj, inkluzivas tri nivelojn:

- BAZA (B)
- PROGRESIGA (P)
- SUPERA (S)

La apudaj tabeloj prezentas al niaj legantoj kelkajn informojn pri la situacio rilate al la kursoj. Ni nur enmetas ĉi tie la ciferojn de la kursoj rekte gviditaj de ni. Pluraj asocioj organizas kursojn laŭ nia oficiala modelo kaj BEL interkonsente donas la diplomojn
Ni estas certaj, ke inter la gelernantoj estas kelkaj el la estontaj gvidantoj de la esperantista movado en brazilaj urboj.
Ni esperas, ke niaj gekursanoj iros ĝis la fino de la kursoj kaj progresos seninterrompe.
Ni ankaŭ esperas ke ĉiu fariĝos obstina divastiganto de la internacia lingvo.
Rimarku, ke inter la gelernantoj aperas loĝantoj en 28 urboj kiuj apartenas al 13 ŝtatoj.
Jen la ŝtatoj, laŭ la nombro de kursanoj enskribitaj en korespondaj kursoj:

RJ (20) –MG (9) –SP (7) –PR (3)
SC (3) –PA (1) –DF (1) –PB (1)
MT (1) –RS (1) –GO (1) –PE (1)
MA (1).

KURSOJ PER KORESPONDADO

| URBOJ | NOMBRO DE GELERNANTOJ | | | |
|---|---|---|---|---|
| | · B | · P | · S | SUMO |
| ARAXÁ – MG | 4 | 2 | – | 6 |
| BELÉM – PA | 1 | – | – | 1 |
| BRASÍLIA – DF | – | 1 | – | 1 |
| CAMPINA GRANDE – PB | 1 | – | – | 1 |
| CAMPINAS – SP | 2 | – | – | 2 |
| CÁCERES – MT | 1 | – | – | 1 |
| CURITIBA – PR | 1 | 2 | – | 3 |
| FLORIANÓPOLIS – SC | – | 2 | – | 2 |
| IPATINGA – MG | 1 | – | – | 1 |
| ITAPERUNA – RJ | 1 | – | – | 1 |
| JUIZ DE FORA – MG | 1 | – | – | 1 |
| NAVEGANTES – SC | 1 | – | – | 1 |
| NITERÓI – RJ | 1 | – | – | 1 |
| N. IGUAÇU – RJ | 1 | – | – | 1 |
| OURO BRANCO – MG | – | 1 | – | 1 |
| PELOTAS – RS | 1 | – | – | 1 |
| PIRACICABA – SP | 1 | – | – | 1 |
| PORANGATU – GO | 1 | – | – | 1 |
| RECIFE – PE | 1 | – | – | 1 |
| RIBEIRÃO PRETO – SP | 1 | – | – | 1 |
| RIO DE JANEIRO – RJ | 5 | 6 | 1 | 12 |
| S.J. MERITI – RJ | 1 | – | – | 1 |
| S.J. RIO PARDO – RJ | 1 | – | – | 1 |
| SÃO LUÍS – MA | 1 | – | – | 1 |
| SÃO PAULO – SP | – | – | 2 | 2 |
| SOROCABA – SP | 1 | – | – | 1 |
| V. REDONDA – RJ | 1 | 1 | 1 | 3 |
| SUMO | 31 | 15 | 4 | 50 |

| | NOMBRO DE GELERNANTOJ | | | |
|---|---|---|---|---|
| NIVELOJ | BAZA | PROGRES-SIGA | SUPE-RA | SUMO |
| PER KO-RESPON-DADO | 31 | 15 | 4 | 50 |
| EN KLASO | 38 | 9 | 3 | 44 |
| SUMO | 63 | 24 | 7 | 94 |

ĈU VIA URBO APERAS EN TIU APUDA LISTO?
SE NE, VARBU ALMENAŬ UNU REPREZENTANTON! SE JES, GRATULON!

# KUNLABORO INTER BEL KAJ LKK

De s-ano Carlos Cunha, kasisto de la LKK por la 66a Universala Kongreso de Esperanto, alvenis dankletero al BEL enhavanta, inter aliaj, la jenajn frazojn:

> *"Granda kunhelpo estis por ni la laboragado de BEL ĉe EMBRATUR, koncerne la pretigon de la unua bulteno kaj de ilustritaj afiŝoj, kiujn ni respektive disdonis kaj ekspoziciis en Stokholmo dum la 65a UKE. Por la efika agado de BEL multe kontribuis viaj kunestraranoj, s-roj AMARILIO CARVALHO kaj ALAN ROMERO, al kiuj, ni petas, bonvolu prezenti nian plej koran dankon."*

La aŭtoro de la teksto estas D-ro Roberto Passos Nogueira, kaj la unua kontakto kun EMBRATUR, en Brazilio, estis farita de lia senatana moŝto José Lins Albuquerque. En Rio, la unua kontakto kun EMBRATUR estis farita de nia veterano Mário Ritter Nunes, kiu bone malfermis la pordojn por ni. Mário Ritter Nunes estas la bona organizinto de pluraj brazilaj Esperanto-kongresoj, kiu denove oferas sian helpon al BEL. La peza laboro okazis poste. Amarílio kaj Alan devis halti plurajn rutinajn laborojn en BEL por urĝege labori ĉe EMBRATUR kaj SWISSAIR. 30.000 belegaj turismaj bultenoj en Esperanto, grandaj allogaj afiŝoj ankaŭ en la internacia lingvo estis rapide preparitaj, kun zorgoj pri redakta korekteco, kaj alvenis ĝustatempe al la UK en Stokholmo. Tiaj sukcesoj estas eblaj nur kiam en ĉiuj urboj de nia lando, kie la laboro fariĝas necesa, ĉiu plenumas sian parton de la granda tasko. Nogueira redaktis. Amarilio kaj Alan reviziis kaj pakis, kaj ankaŭ prenis multajn aliajn gravajn decidojn ĉe EMBRATUR kaj ĉe la propaganda entrepreno MPM, por ke la bildoj estu plej trafaj. Kaj SWISSAIR senpage transportis niajn pakaĵojn al Stokholmo. Al ĉiuj gratulon!

GLUMARKOJ de la 66a UK

**Vi jam povas aĉeti en BEL la glumarkojn de la 66a Universala Kongreso. La minimuma aĉetkvanto ĉe ni estas dek glumarkoj, kaj ĝia prezo estas 30 kruzejroj po deko.**




# MEMBRARO DE UEA

Laŭ informoj aperintaj en la JARLIBRO-1980, en 1979 UEA havis 30.871 membrojn en 91 landojn. Inter tiuj membroj estis 6.278 individuaj kaj 24.593 aligitaj.

Individuaj membroj estas tiuj kiuj pagas jaran kotizon per si mem. Aligitaj membroj estas tiuj kiuj apartenas al aliĝintaj landaj asocioj, sed ne apartenas al la kategorio "individua membro" de UEA.

La JARLIBRO sciigis nin, ke laŭ la nombro de individuaj membroj elstaris la jenaj landoj:

1ª FRANCUJO – 561 ; 2ª SVEDUJO – 462 ; 3ª F.R. GERMANUJO – 458

4ª NEDERLANDO – 429 ; 5ª USONO – 417 ; 6ª JAPANUJO – 349

7ª BRAZILO – 344

Gratulinda estas la laboro de niaj du landaj asocioj, de nia ĉefdelegito G. Grattapaglia kaj de la delegito de UEA en Rio de Janeiro, S-ano L. Brieger, kiu delonge, el la sidejo de BEL, bombardas la tutan landon per aliĝiloj por nia organizo.

Pri la membraro de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) oni povas legi en la Jarlibro, ke en 1979 tiu institucio havis 322 individuajn membrojn en 46 landoj. Jen la plej elstaraj landoj laŭ la sama antaŭa kriterio:

1ª F.R. GERMANUJO – 31 ; 2ª FRANCUJO – 30 ; 3ª JAPANUJO – 27;
4ª USONO – 24 ; 5ª BRAZILO – 22 ; 6ª BELGUJO – 16 ;
7ª ITALUJO – 14 ; 8ª PERUO kaj BRITUJO – 11

Gratulon al BEJO, kies bonkvalita revuo montris grandan potencialon. Daŭrigu vian laboron! Antaŭen! Vi baldau havos la devon anstataŭi nin.

## Trofeo Fyne

La estraro de UEA aljuĝas la Trofeon Fyne, donacitan memore al Adam kaj Erica Fyne de Kanado, ĉiun duan jaron al la landa asocio aliĝinta al UEA kaj kun pli ol 150 membroj, en kies lando okazis la plej granda proporcia kresko de la nombro de individuaj membroj de UEA dum la antaŭaj du kalendaraj jaroj, aŭ kiu alimaniere grave kontribuas al la plifortigo de UEA.

Jen la ĝisnunaj gajnintaj landaj asocioj:

1975 – SVEDA ESPERANTO – FEDERACIO

1977 – JAPANA ESPERANTO – INSTITUTO

1979 – BELGA ESPERANTO – FEDERACIO

Ĉu la trofeo estos nia en la jaro de nia Kongreso? Kial ne? Oni komencu ekde nun la varbadon! Se vi ankoraŭ ne estas individua membro de UEA aliĝu tuj al tiu gravega Asocio pere de Brazila Esperanto-Ligo aŭ de Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

## Statistiko pri la delegitaro de UEA

Observante la tabelon aperintan sur la 404/405 a paĝo de Jarlibro-80 ni fiere konstatas, ke la plej bona ŝanĝo okazinta, inter la jaroj 1977-1980, rilate al la kresko de la delegita reto de UEA, estis en Brazilo.

La Delegita Reto de UEA konsistas el 2256 personoj en 63 landoj. Temas pri entute 3572 delegitecoj.

Dum la tri lastaj jaroj la delegita reto kreskis je 233 delegitecoj kaj Brazilo kontribuis kun 65 el tiuj delegitecoj (PLI OL KVARONO DE LA SUMO!). La fakto ke BEL tiam refariĝas landa asocio de UEA, multe helpis tiun kreskadon. Nuntempe, en Brazilo, estas 136 individuoj kiuj helpas la esperantistaron kiel delegitoj. Kelkaj el ili estas delegitoj pri du aŭ tri fakoj, tiel ni havas entute 205 delegitecojn, rilate al 136 individuoj.

Ĉu vi jam pensis pri via kandidatiĝo al delegita posteno? Kial ankoraŭ ne? Skribu al ni.




## PRELEGO PRI LA METODO "AŬDU KAJ LERNU" EN LA FEDERACIA UNIVERSITATO DE PARANÁ

Profitante sian oficialan vojaĝon al la Federacia Universitato de Paraná, la prezidanto de BEL kontaktiĝis kun la loka esperantistaro, vizitis la esperanto-kursojn en la universitato kaj faris tie, la 12 an de novembro, oficialan prelegon pri la temo: Nova metodo por la instruado de esperanto. Estis multe de ĉeestantoj kaj granda intereso pri la temo.

## ESPERANTLINGVAJ RADIOPROGRAMOJ DUM LA JARO 1979

Sur la 89ª paĝo de Jarlibro 1980 oni vidas tabelon enhavantan informojn pri radio-elsendoj okazintaj en 1979.

Ĝoje ni konstatis ke Brazilo estas inter la 11 menciitaj landoj kiuj regule elsendas esperantajn programojn.

La Jarlibro rimarkis, ke entute en la jaro 1979 disaŭdiĝis 2983 radio-elsendoj per 14 stacioj dum 1082 horoj, inkluzive de kursoj. Ĝi aldonis, ke inter la menciitaj stacioj, 2 (Sorokaba kaj Sabadell) disaŭdigis kursojn dum proksimume 30 horoj.

Finfine ni rimarkis, ke nur la tri unuaj radistacioj disaŭdigis pli granda nombro da horoj ol Radio Sorokaba:

1ª Varsovio (Pollando) ............. 547 horoj kaj 30 minutoj
2ª Pekino (Ĉinujo) ................ 222 horoj
3ª Lisbono (Portugalujo) ............ 86 horoj kaj 40 minutoj
4ª Sorokaba (Brazilo) .............. 52 horoj
4ª Bern (Svislando) ............... 52 horoj

Ni elkore gratulas la samideanojn de Sorokaba pro tiu elstara situacio kaj pro ilia diligenta laboro por la divastigo de nia idealo.

Ni ankaŭ petas al la samideanoj, kiuj partoprenas en la programoj elsenditaj de Radio Sorokaba kaj Rio de Janeiro, transdoni al la estraranoj de tiuj stacioj niajn sincerajn dankojn pro la daŭra apogo al nia movado. BEL profitas la okazon por anonci, ke ek de decembro ĝi jam havos tute pretan 20-lecionan kurson (po 15 minutoj) je dispono de ĉiuj radistacioj de Brazilo.

Ĉu Brazilo fariĝos la unua lando en nombro de elsend-horoj?

# Esperanto en radio

laŭ horaro de Brasília

**ĈIUTAGE**

02,00 — 02,30 — **Varsovio** (Pollando), 41,27 m/7270 kHz, 48,90 m/6135 kHz, 50,04 m/5995 kHz, 75,85 m/3955 kHz, 200 m/1503 kHz.

12,30 — 13,00 — **Varsovio**, 31,50 m/9525 kHz, 42,11 m/7125 kHz.

18,30 — 18,55 — **Varsovio**, 41,18 m/7285 kHz, 49,22 m/6095 kHz, 50,04 m/5995 kHz, 75,85 m/3955 kHz, 200 m/1503 kHz.

~~18,30 — 19,00~~ — **Pekino**, 25,75 m/11650 kHz, 32,03 m/9365; por Latinameriko. 19,30/20 h

**DIMANĈE**

17,00 — 17,20 — **Romo** (Italio), 25,42 m/11800 kHz, 30,90 m/9710 kHz, 41,24 m/7275 kHz.

17,05 — 17,15 — **Vatikano**, 19,84 m/15120 kHz, 25,64 m/11700 kHz, 31,10 m/9645 kHz, 31,17 m/9625 kHz, 41,38 m/7250 kHz, 48,47 m/6190 kHz, 196 m/1530 kHz; informoj, intervjuoj, koresp.

19,00 — 19,15 — **Rio de Janeiro** (Brazilo), 214 m/1400 kHz; dissendo spiritisma.

21,00 — 22,00 — **Sorocaba** (Brazilo), 278 m.

**ĴAŬDE**

03,10 — 03,25 — **Vatikano**, 96,5 MHz, 93,0 MHz, 19,84 m/15120 kHz, 25,55 m/11740 kHz, 25,61 m/11715 kHz, 31,10 m, 31,17 m, 41,38 m, 48,47 m.

**Kelkaj adresoj: Radio Pollando**, Esperanto, p.k. 46, PL-00-950 Warszawa; **Radio Pekino**, Esperanto, Beijing; **Radio Roma**, Esperanto, p.k. 320, I-00100 Roma Centro corr., **Radiovaticana**, Esperanto, Piazza Pia 3, I-00193 Roma; **Rádio Clube de Sorocaba**, Esperanto, cx postal 234, BR-18.100 Sorocaba SP; **Braz. Spiritisma Fed.** av. Passos 30, BR-20.051 Rio de Janeiro

## BEL DISVASTIGAS ESPERANTON ĈE MONDA KONGRESO DE UPU

*Ĉiun jarkvinon Universala Poŝta Unio havas sian tutmondan kongreson. En 1979 tiu mondkongreso okazis en Rio-de-Janejro. UEA petis, ke BEL agu sianome kaj tio estis farita: 1.000 specialaj seslingvaj informiloj estis faritaj kaj disdonitaj al ĉiuj delegitoj kaj internaciaj funkciuloj. Poste BEL ricevis la jenan leteron de H. Tonkin:*

Universala Esperanto-Asocio

en konsultaj rilatoj kun Unesko

PREZIDANTO:
D-ro Humphrey Tonkin
35 Violet Lane
Lansdowne, PA 19050
Usono
Telefono: (215) 259-8821

30 oktobro 1979

Prof. Sylla Chaves, prezidanto
Brazila Esperanto-Ligo
Praça da República, 54 - 2°
20 211 Rio de Janeiro
Brazilo

Kara Amiko,

Mi skribas nur mallonge por forte gratuli vin pro via interveno pri UPU. Malgraŭ ĉiuj niaflankaj stumbloj, BEL bonege intervenis por solvi la problemojn, kaj tiel la partoprenintoj en la konferenco ja ricevis taŭgajn informojn pri Esperanto.

Ĉu vi havas sugestojn pri venontaj paŝoj pri UPU?

Kore salutas,

Humphrey Tonkin

kopie: s-ino Ursula Grattapaglia
d-ro Victor Sadler



Simo Milojevič



Age Martin Skovrind



## EKSTERLANDANOJ EN NIA SIDEJO

Dum la kuranta jaro BEL plezure akceptis en sia sidejo la jenajn eksterlandanojn:

El **Japanio** – AKIO MINAMYAMA, juna studento pri Beletristiko, farinta kurson pri la verkaro de la fama poeto kaj sanktulo Anchieta (Anŝieta), en la Federacia Universitato de Rio-de-Ĵanejro. Akio multfoje partoprenis en niaj kunvenoj kaj babiladis kun la kursanoj por kuraĝigi ilin. Antaŭ lia foriro al Japanio li faris, en nia sidejo, bonegan prelegon titolitan "Aspektoj pri Japanio".

El **Danlando** – AGE MARTIN SKOVRIND, juna profesoro el Kopenhago. Dum 6 monatoj li turisme vojaĝis tra Sudameriko. Simpatie kaj inteligente li rakontis al ni, dum kultura kunveno, kial "Danlando fartas tre bone, dankon!".

El **Ĉinio** – Pastro J.B. SE–ĈIEN KAO O.F.M., tradukinto en la ĉinan lingvon de la Antologio de Brazilaj Rakontoj eldonita de BEL. Tiu simpatia kaj klera samideano, loĝanta en malproksima lando, kelkfoje vizitis Brazilon. Antaŭe li restis preskaŭ 8 jarojn en Rio, kie li direktis la laboron por la 3ª Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno, okazinta en 1955. Ĉi-jare li revenis al Rio kiel vizitanto, kaj profitis la okazon por revidi kelkajn amikojn ĉe ni. Dum lia restado en nia sidejo li partoprenis, kiel observanto, en-klasajn lecionojn, kaj komentariis pri la bona kvalito de la supera kurso gvidata de nia samideano Jorge Campos.

El **Italio** – S–ro LEANDRO TACCONI kaj edzino. De tiuj ĝentilaj gesinjoroj ni ricevis interesajn informojn pri la esperanta movado en Milano. S–ro Tacconi eble revenos al Brazilo en la proksima jaro kaj partoprenos en la 66ª UK.

El **Francio** – S–ro RAYMOND BOUCHON

El **Kanado** – S–ro ROBERT ELLIS

El **Usono** – la alaskanoj S-roj WALTER GNAGY kaj JACK LESH

El **Nederlando** – S–ro SIMO MILOJEVIĈ, redaktoro de la revuo ESPERANTO. Por bone kompreni la gravecon de tiu vizito ni sugestas la legadon de la raporto farita de nia vizitanto aperinta sur la paĝo 121ª de ESPERANTO, n–ro 895–6/80, sub la titolo "La Movado estas universala, sed ni pensas kaj agas eŭrope". Ni tre dankas al S–ro Milojević la atenton, kiun li dediĉis al ni dum pluraj tagoj en nia sidejo kaj la agrablajn momentojn de kunlaboro por la konkretiĝo de niaj idealoj.

## 2ª NORDORIENTA RENKONTIĜO DE ESPERANTO

*Kun la sama sukceso de la Unua Nordorienta Renkontiĝo, en Natal, kaj ankaŭ patronita de BEL, okazis la Dua Renkontiĝo, en Garanhuns, Pernambuko, de la 4a ĝis la 6a de julio, kun proksimume 100 partoprenantoj. La ĉefa temo estis la instruado de Esperanto. Prezidis la kunvenojn D-ro Mabesoone, kaj estis unuafoje prezentita la metodo preparita de BEL. La dua ĉefa temo estis la interŝanĝo de spertoj inter la nordorientanoj, kaj ilia interŝanĝo kun la naciaj organizoj. Multe da interesaj informoj estis interŝanĝitaj ankaŭ pri tiu temo. Kaj oni decidis okazigi 3an renkontiĝon venontjare en Maceió (AL). La nura bedaŭrinda okazaĵo, estis kelkaj gutoj da malamo portugallingve elverŝitaj de partoprenanto, kiu alvenis en la fino de la kunveno. Eble tio okazis pro nura misinformo. Tamen tiu malpaceto estis la temo de la dimanĉa prediko de Pastro Machado. Se Esperanto estas la lingvo kreita de Zamenhof kun sia tuta amo, kial ne uzi niajn kunvenojn kaj periodaĵojn nur por laboro kaj amo? Pastro Machado, estu certa, ke almenaŭ BEL ne respondos al malamo kun malamo. Se ni estas en la Esperanto-movado, niaj nuraj celoj estas labori por nia lingvo kaj kontribui por la ekesto de mondo plena je amo kaj paco. Dankon kaj gratulon, pastro Machado. Kaj ankaŭ dankon kaj gratulon al la organizintoj de la renkontiĝo en Garanhuns kaj Recife, kaj al la partoprenantoj el la tuta Nordoriento. Antaŭen!*

### BONVENON, FONTO!

*En Chapecó, en la brazila internlando, ĵus naskiĝis FONTO — eldonejo, beletra revuo kaj pluraj servoj. Ni kore gratulas vin, respondeculojn de FONTO, pro la bona kvalito de via laboro. Ni deziras al vi grandan sukceson! Bonvenon, Fonto!*




### NEKROLOGO

Nia samideano José Pedro Miranda, el Ribeirão Preto — SP, informis nin pri la morto de la diligenta 72 jaraĝa Prof-ro OSWALDO ARRUDA STEIN, okazinta en la 8a/VII/80. Prof-ro Stein estis la fondinto de Couto Fernandes Esperanto—Klubo (Cravinhos — SP, 1938). Li ankaŭ estis kunfondinto de Ribeirão Preto Esperanto-Klubo (Ribeirão Preto — SP, 1966) kaj kunlaboris en Instituto Esperanto de Ribeirão Preto. Dum multaj jaroj li instruis Esperanton en tiuj urboj kaj gvidis la lernejon "Grupo Escolar João Nogueira", el Cravinhos. Li estis la unua Honora Membro de Ribeirão Preto Esperanto-Klubo.

Ni sincere priploras la forpason de tiu granda batalanto.

## GRAVEGA DOKUMENTARO

En la Biblioteko Carlos Domingues, ĉe nia asocio, estas tuta kolekto de la oficiala bulteno "Brazila Esperantisto", je dispono de membroj de BEL.

Krom tiu bindita kolekto, BEL havas kelkajn ekzemplerojn de ĉiuj aperintaj numeroj de Brazila Esperantisto, kiuj povas esti akiritaj de niaj anoj, je Cr$ 30,00 (tridek kruzejroj) po unuo.

Pri la graveco de tiu dokumentaro, por ĉiuj, kiuj deziras koni la evoluon de la esperanta movado en nia lando, ni bezonas diri nenion.

Ĉiu loka asocio meritas havi tiun kolekton. Faru tuj vian mendon al nia libro-servo.






## ESPERANTA KANTISTINO PREMIITA EN INTERNACIA FESTIVALO

Defendante la brazilan kanzonon **Amazonas-Marañón** de Alberto Gino (prononcu: Ĵino), **Franca Fenati** (prononcu: Franka) gajnis la unuan premion de la kategorio amazonia kanzono en la DUA INTERNACIA FESTIVALO DE AMAZONIO okazinta en la perua urbo Iquitos (Ikitos) en 25-27/VI/80. Franca Fenati kantas en pluraj lingvoj. Ŝi naskiĝis en Italio, sed delonge loĝas en Brazilo. Ŝia unua Esperanta disko estis **Brazilo Kantas** (1970). Ĉi-jare ŝi jam registris plurajn kanzonojn en Esperanto por tri baldaŭ aperontaj diskoj. Korajn gratulojn pro via festivala venko, Franca Fenati!

## REMEMORINDAJ KONSILOJ

Foliumante malnovan ekzempleron de Brazila Esperantisto (n-ro 5–6–Majo/Junio – 1916), ni trovis ĉi tiujn orajn konsilojn:

### Dek Reguloj por Esperantistoj

*1 – Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto kaj lasu la versfaradon al la poetoj.*

*2 – Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.*

*3 – La plibonigistoj diskutu; vi fundamenton sekvu kaj fidela restu.*

*4 – Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.*

*5 – Kion vi povis lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵo ne faru regulon kaj el regulo ne faru malgravaĵon.*

*6 – Verkante en Esperanto, ne kredu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron; ne malesperu, se mankas aĉetantoj.*

*7 – Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperante parolu.*

*8 – Atentu, ke la internacia lingvo vivas nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa; senlace varbu por U.E.A.*

*9 – Legu gazeton por ke vi konu novajn faktojn; abonu por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.*

*10 – Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.*

*H. St.*

*(El La Ĥina Brileto).*

En la Zamenhofa tago 1980 granda venko de la brazilaj esperantistoj: lanĉo de la metodo Aŭdu kaj Lernu en Fondaĵo Getúlio Vargas (Rio) kaj en Rádio Cultura (Sanpaŭlo).

FUNDAÇÃO GETÚLIO VARGAS
GABINETE DO PRESIDENTE

PF/1523/80

Rio de Janeiro, RJ, 14 de outubro de 1980

Ilmº Sr.
Sylla Chaves
Presidente
Liga Brasileira de Esperanto
Praça da República, 54 - 2º andar
20211 - Rio de Janeiro - RJ

Senhor Presidente,

Confirmando nossos entendimentos pessoais, reafirmo o grande interesse desta Fundação pela divulgação do idioma internacional esperanto em nosso país. Considero que, nestes meses que antecedem o Congresso Mundial de Esperanto, que se realizará em Brasília, em julho de 1981, tendo como patrono o Senhor Presidente da República, General João Batista de Figueiredo, é bastante oportuna a intensificação do ensino desse idioma da fraternidade universal.

Em vista disso, a Fundação Getulio Vargas oferece sua participação como co-editora do método AUDU KAJ LERNU (Ouça e Aprenda), de autoria de V. Sª., para o ensino do idioma internacional pelo rádio e por fitas cassete.

Atenciosamente,

Luiz Simões Lopes
Presidente

FUNDAÇÃO PADRE ANCHIETA
Centro Paulista de Rádio e TV Educativa

São Paulo, 06 de novembro de 1980

Exmo. Sr.
Sylla Chaves
Rua Barão de Itambi, 07 apto 802
Rio de Janeiro -

Prezado Senhor,

Pela presente temos o prazer de informar que o Curso de Esperanto a nós cedido por V.S., será levado ao ar todas as segundas-feiras às 14:30 (com repetição às 22:15), a partir do dia 15 de dezembro de 1980. Aproveitamos a oportunidade para solicitar de V.S. todo o material de promoção que seja necessário para a melhor divulgação do curso.

atenciosamente

Sergio Viotti
Rádio Cultura